



# La historio de Kogja Hasan al-Habal

k

Por ĉi tiu fabelo estas uzata la tiparo *Res Publica*, desegnita de Franko Luin. La kajero estas unu en serio de fabelkajeroj prezentantaj la tiparojn de la sama desegnisto. Ili estas elŝuteblaj ĉe [www.omnibus.se/fabelaro](http://www.omnibus.se/fabelaro).

---

© 2002 Omnibus Typografi

---

OMNIBUS TYPOGRAFI

BOX 135 · SE-135 23 TYRESÖ · TEL. +46 8 742 83 36

[franko@omnibus.se](mailto:franko@omnibus.se) · [www.omnibus.se](http://www.omnibus.se)

---

**P**or ke Via Reĝa Moŝto pli bone komprenu per kiaj rimedoj mi atingis la prosperon, kiun mi nun ĝuas, mi diru, ke mi havas du intimajn amikojn en Bagdado, ankoraŭ vivantajn, kiuj povas atesti la verecon de mia rakonto, kaj al kiuj, post Dio, la kreanto de ĉio bona, mi ŝuldas mian tutan sukceson.

La du amikoj estas nomataj Saadi kaj Saad. Saadi, kiu estas tre riĉa, ĉiam opiniis, ke neniu homo povas esti feliĉa en ĉi tiu mondo sen granda riĉeco, kiu ebligos al li vivon sendependa je ĉiu.

Saad havis alian opinion; li konsentis, ke la riĉaĵoj estas necesaj, sed konstatis, ke la feliĉo de la homa estado konsistas en la virto, sen amo al mondaj posedaĵoj, krom ĝis tia grado, ke ili estas efektive necesaj por subteni la vivon kaj, krom tio, fari bonon al aliaj. Saad mem estas unu el tiu nombro, kaj vivas tre feliĉe kaj kontente en sia stato; kaj, kvankam Saadi estas senlime pli riĉa, ilia amikeco estas tre sincera, kaj la pli riĉa el la ambaŭ ne taksas sin pli alte ol la alia. Ili neniam disputis krom pri tiu punkto; pri ĉiuj aliaj aferoj ilia amikeco estas tute sen maltrankvilo.

Iun tagon, kiam ili parolis pri tiu temo — kiel ili ambaŭ rakontis al mi poste — Saadi certigis, ke malriĉeco de-

venas de tri kaŭzoj; ke homo estas naskita malriĉa; ke li malŝparas sian riĉaĵon per lukso kaj diboĉo; ke li ĝin perdas per kelkaj el tiuj neantaŭviditaj fatalaĵoj, kiuj ne estas maloftaj en la mondo. Li daŭrigis diri, ke la malriĉuloj restas malriĉaj, simple ĉar ili ne povas akiri sufiĉon da kontantoj por starigi sin en ia metio, aŭ por puŝi sin antaŭen en la mondo; sed, se ili povus havigi al si tian helpon, tiuokaze ili havus nenion plu por fari ol bone profiti la okazon por fariĝi riĉaj — jes, kaj eĉ efektive treege riĉaj.

Tia estis la rezonado de Saadi; sed Saad ne povis konsenti je liaj opinioj. ”La rimedoj,” li diris, ”per kiuj eĉ vi proponas riĉigi malriĉulon, ne estas tiel certaj, kiel vi opinias. Via projekto estas tre hazarda, kaj mi povus alporti multe da bonaj argumentoj kontraŭ viajn opiniojn, sed ili nin kondukus tro malproksimen. Mi kredas, kun egala verŝajneco, ke malriĉulo povas riĉigi per aliaj rimedoj ol per mono.”

”Saad,” respondis Saadi, ”mi vidas, ke ni ne trafos ian kontentigan interkonsenton, se mi persistos meti mian opinion kontraŭ la via. Por konvinki vin, mi faros eksperimenton, donante, ekzemple, sumon da mono al iu metiisto, kies prapatroj, de patro al filo, estis ĉiam malriĉaj, kaj vivis nur per ĉiutaga laboro, kaj mortis tiel malriĉaj, kiel ili estis naskitaj. Se mi ne trafos la sukceson, kiun mi atendas, vi povos ekprovi, ĉu vi pli bone sukcesos per la rimedoj, kiujn vi uzos.”

Kelkajn tagojn post la disputo, okazis, ke la du amikoj promenis kune, kaj trapasis la straton, kie mi laboris en mia budo super mia metio de ŝnurfaristo, kiun mi lernis

de mia patro, kiu ĝin lernis de sia, kaj tiu de siaj prapatroj. Laŭ mia vestaĵo kaj eksteraĵo, ne estis malfacile diveni mian malriĉecon.

Saad, rememorante la promeson de Saadi, diris: "Se vi ne forgesis, kion vi diris al mi, jen homo (montrante al mi), kiun mi jam de longe vidis prilaboranta sian metion kiel ŝnurfaristo, kaj ĉiam en la sama stato de malriĉeco; li estas homo inda je via malavareco, kaj tute konvena por via eksperimento."

La du amikoj alpaŝis al mi; kaj Saadi, dirinte al mi "bonan matenon," demandis mian nomon. Mi respondis: "Sinjoro, mia nomo estas Hasan; sed, pro mia metio, mi estas ordinare konata per la nomo, Hasan al-Habal."

"Hasan," diris Saadi, "estas nenia metio, per kiu homo ne povas sin nutri, kaj mi ne dubas, ke la via alportas al vi sufiĉon; sed mi miregas, ke — konsiderante la longan tempon, dum kiu vi laboris en via metio — vi ne ŝparis sufiĉe da mono por akiri bonan provizon da kanabo kaj per tio plivastigi vian negocon kaj dungi pli da homoj, per kies laboro vi baldaŭ pligrandigus vian enspezon."

"Sinjoro," mi respondis, "vi ne miregos plu, ke mi ne ŝparis monon kaj sekvis la vojon, kiun vi ĵus nomis, por akiri riĉecon, kiam vi ekscios, ke, kvankam mi laboras laŭ mia eblo de mateno ĝis nokto, mi povas apenaŭ gajni sufiĉon por havigi panon kaj fabojn al mi kaj al mia familio. Mi havas edzinon kaj kvin infanojn, kaj ne unu el la lastenomitaj estas sufiĉe aĝa por doni al mi la plej malgrandan helpon."

Kiam mi finis paroli, Saadi diris al mi: "Hasan, se plaĉas al mi doni al vi monujon kun ducent orpecoj, ĉu vi

farus bonan uzon el ĝi? Kaj ĉu vi kredas, ke per tia sumo vi povus baldaŭ fariĝi tiel riĉa kiel la plej lerta homo el via profesio?”

”Sinjoro,” mi respondis, ”tia bonkora ĝentilulo kiel vi videble estas, certe ne intencas sin amuzi per mi, sed en plena seriozeco faras tiun afablan proponon. Mi povas do diri sen fanfarono, ke per monsumo multe malpli granda ol tio, mi povus fari min ne sole egale riĉa kiel la plej sukcesa el miaj sammetianoj, sed post iom da tempo eĉ pli riĉa ol la tuta aro da ŝnurofarantoj en ĉi tiu urbo, kvankam la urbo Bagdado estas tiel grandega kaj homoplena.”

La malavara Saadi eltiris monujon el sia brustaĵo, kaj, metinte ĝin en miajn manojn, diris: ”Jen, prenu ĉi tiun saketon; vi trovos, ke ĝi enhavas ducent orpecojn; mi petas, ke Dio vin benu per ili, kaj donu al vi difavoron fari tian uzon el ili, kian mi deziras; kaj kredu min, ke mia amiko Saad, kiun vi tie ĉi vidas, kaj mi, ambaŭ havos grandan plezuron trovi, ke la mono kunhelpos por fari vin pli prospera ol vi nun estas.”

Ricevinte la monujon, mi ĝin metis en mian brustaĵon, sed mi estis tiel ravita de ĝojo, kaj tiel kortuŝita de dankemo, ke la vortoj al mi mankis, kaj mi povis doni al mia bonfaranto neniam aliajn signojn de mia dankemo ol tio, ke mi kaptis la borderon de lia vesto kaj ĝin kisis; sed li ĝin fortiris de mi; kaj li kun sia amiko daŭrigis sian promenon.

Tuj kiam ili foriris, mi revenis al mia laboro; kaj mia unua penso estis: ”Kion mi faros pri mia monujo por ĝin gardi senriske?” Mi ne havis en mia humila malgranda



loĝejo skatolon nek ŝrankon por ĝin enŝlosi, nek ian alian lokon, kie mi povus esti certa, ke oni ne trovos ĝin, se mi ĝin kaŝas.

En tiu embaraso — ĉar mi kutimis, simile al aliaj homoj de mia rango, meti mian malmultan monon en la faldaĵojn de mia turbano — mi lasis mian laboron kaj eniris la domon, sub preteksto refaldi la turbanon. Mi zorgis, ke nek la edzino nek infanoj vidu, kion mi faris. Sed unue mi metis flanken dek orpecojn por la tujaj bezonoj, kaj envolvis la ceterajn en la faldojn de la tolo, kiu ĉirkaŭis mian ĉapon. Mia unua kaj ĉefa aĉetaĵo en tiu tago estis bona provizo da kanabo, kaj poste, ĉar mia familio de longa tempo ne manĝis buĉistan viandon, mi iris sur la vendejon kaj aĉetis ion bongustan por vespermanĝo.

Dum mi portis hejmen en mia mano la viandon, malsata milvo flugis sur min, kaj estus forkaptinta la viandon, se mi ĝin ne pretenus tre forte; sed, ho ve! estus pli bone por mi ellasi ĝin ol perdi mian monon; ju pli forte mi pretenis la viandon, des pli penegis la birdo por akiri ĝin, tirante min jen al unu flanko, jen al la alia; sed ĝi ne volis forlasi la kaptaĵon, ĝis kiam, malfeliĉe pro miaj penegoj, mia turbano falis teren.

La milvo tiuj ellasis sian tenegon, kaj, kaptinte la turbanon, antaŭ ol mi povis ĝin levi, forflugis kun ĝi. Mi kriis tiel laŭte, ke ĉiuj viroj, virinoj kaj infanoj sur la strato ekscitiĝis, kaj kunkriis kun mi por igi la milvon ellasi ĝin; ĉar per tiaj rimedoj tiu speco de manĝegemaj birdoj estas ofte devigita ellasi sian kaptaĵon. Sed niaj krioj ne timigis tiun milvon; ĝi forportis mian turbanon

kaj malaperis antaŭ ol ĝin ellasi; tial, se mi kurus post ĝi, mi nur lacigus min vane.

Mi iris hejmen, tre malĝoja pri la perdo de mia turbano kaj mono. Mi devis aĉeti alian turbanon, kio malpliigis la malmultan restaĵon el la dek orpecoj; ĉar mi multon elspezis por kanabo. La tre malgranda restaĵo ne sufiĉis por kontentigi la grandajn esperojn, kiujn mi jam naskis.

Dum daŭris la cetero el la dek pecoj, mia malgranda familio kaj mi pli bone vivis; sed baldaŭ mi falis en la saman malriĉecon kiel antaŭe, kaj mi estis egale senpova liberigi min de tiu mizero. Tamen, mi neniam murmuris nek plendis. "Plaĉis al Dio," mi diris, "doni al mi riĉaĵojn, kiam mi malplej ilin atendis; nun, preskaŭ en la sama momento, Li ilin reprenis de mi, ĉar estis Lia volo, kaj ili estis je Lia dispono. Tamen, mi gloros Lian nomon pro ĉiuj Liaj bonfaroj; kaj mi kliniĝos, kiel mi ĝis nun ĉiam faris, al Lia volo."

Tiaj estis miaj sentoj, dum mia edzino — kiun mi ne povis ne sciigi pri la perdo, kiun mi suferis — estis ne-konsolebla.

Ĉirkaŭ ses monatoj post tiu terura malfeliĉo, la du amikoj promenis denove tra tiu parto de la urbo, kie mi loĝis; kaj la najbaraĵo, kompreneble, rememorigis min al Saad.

Kiam ili eniris mian budon, Saadi tiel miregis vidi la malmultan ŝanĝon en mia stato kaj en la vidiĝo de la ŝnurfabriko, ke li momente ne povis paroli. "Nu, Hasan," diris Saad, "ni ne demandos de vi, kiel la aferoj progresis de post nia lasta vizito; sendube ili pli bone prosperas."



”Sinjoro,” mi respondis, alparolante ilin ambaŭ, ”mi tre ĉagreniĝas diri, ke viaj deziroj kaj esperoj kiel ankaŭ miaj, ne trafis la sukceson, kiun vi juste atendis, kaj kiun mi promesis al mi. Vi apenaŭ kredos al la eksterordinara aventuro, kiu al mi okazis.” Tiam mi rakontis ĉion, kio fariĝis.

Saadi aŭskultis mian rakonton kun malestimo; kaj diris: ”Hasan, vi mokas min; tio, kion vi diras, estas nekredebla. Kion havas la milvoj por fari el la turbanoj? Ili nur elserĉas ion por satigi sian malsaton. Vi ne estus tiel mizera, se vi tion ne meritus, kaj vi estas malinda je ia bonfaraĵo, kiun oni volus por vi fari.”

”Sinjoro,” mi respondis, ”mi eltenos ĉiujn viajn riproĉojn, kaj, se ili estus multe pli maldolĉaj, mi estus preta elteni eĉ plimultajn, kaj kun tiom pli da pacienco, ĉar mi opinias, ke mi ilin ne meritus.”

Saad fariĝis mia partiano, kaj rakontis al Saadi tiom da same mirindaj historioj pri milvoj — pri kelkaj el kiuj li donis sian propran ateston — ke pro tio Saadi eltiris sian monujon el sia brustaĵo, kaj elkalkulis en mian manon ducent orpecojn, kiujn mi metis en mian brustaĵon pro manko de monujo. Denombrite la sumon, Saadi diris: ”Hasan, mi faras al vi donacon de ĉi tiuj ducent pecojn, sed gardu, ke vi ilin metu en pli senriskan lokon, por ke vi ne perdu ilin, kiel vi tiel malfeliĉe perdis la aliajn; kaj uzu ilin tiamaniere, ke ili havigu al vi la samajn utilojn, kiuj jam povus al vi fari la aliaj, se vi ilin ne perdus.”

Tuj kiam ili foriris, mi forlasis mian laboron kaj iris hejmen; kaj ne trovinte en la domo la edzinon, nek la infanojn, mi eltiris mian monon, kaj, metinte flanken dek

pecojn, mi envolvis la ceterajn en pura tola tuko kaj firme ĝin ligis per nodo. Sed poste mi devis konsideri, kien mi metos la tukon, por ke ĝi estu sendanĝera. Pripensinte iom, mi decidis ĝin meti en la fundon de granda tervazo, plena de brano, kiu staris en angulo, kaj kiun, mi imagis, ke nek mia edzino, nek infanoj esploros.

Baldaŭ poste, mia edzino venis hejmen; kaj mi, ne havante multe da kanabo en la domo, diris al ŝi, ke mi eliros por aĉeti pluan provizon de ĝi; sed mi diris al ŝi nenion pri la vizito de la du amikoj.

Dum mia foresto, sablisto trapasis la straton, kriante, "Sablon, ho! he!" Mia edzino, kiu iom bezonis, alvokis lin; sed, ĉar ŝi ne havis monon, ŝi demandis, ĉu li interŝanĝos sablon por brano. La sablisto petis, ke li vidu la branon. Mia edzino montris al li la tervazon; kaj la interkonsento estis farita; ŝi havis la purigan sablon, kaj la sablisto prenis kun si la vazon kaj branon.

Ne longe poste mi revenis hejmen, ŝarĝita per tiom da kanabo, kiom mi povis porti, kaj sekvata de kvin portistoj ankaŭ per ĝi ŝarĝitaj. Mi ŝidiĝis por ripozi, sed ĉirkaŭrigardinte, ne povis vidi la tervazon da brano. Mi ne povis trovi vortojn por esprimi mian surprizon kaj la konsternon, kiun faris en mi en tiu momento la malapero de la vazo. Mi demandis la edzinon, kio fariĝis el ĝi; ŝi rakontis la interkonsenton, kiun ŝi faris kun la sablisto. "Ha! malfeliĉa virino," mi kriis, "vi ne scias la malutilon, kiun vi faris al mi, al vi mem kaj al niaj infanoj, farante tiun interkonsenton, kiu nin tute ruinigis. Vi imagis, ke vi nur vendas la branon, sed kun ĝi kuŝis cent naŭdek or-



pecoj, kiujn Saadi, denove veninte tien ĉi kun sia amiko, donacis al mi; tial, per tiu sumo vi riĉigis la sabliston.”

Mia edzino fariĝis kvazaŭ frenezulino, kiam ŝi eksciis kian malbonon ŝi nesciante faris. Ŝi ploris, batis la bruston, ŝiris la harojn kaj vestojn. ”Edzino,” mi diris, ”moderigu vian bedaŭregon; plorante kaj kriegante, vi maltrankviligos la tutan najbarajon, kaj ne estas motivo por sciigi ilin pri nia malfeliĉo. Ili nur ridos je ni, anstataŭ kompati nin. Estas multe pli bone elporti pacience nian perdon, kaj submeti nin al la volo de Dio, kaj beni Lin, ĉar, el la ducent orpecoj, kiujn Li donis al ni, Li reprenis nur cent naŭdek kaj lasis al ni dek, kiuj, pro la uzo, kiun mi el ili faros, estos al ni granda helpo.”

Mi ne longigos mian rakonton per miaj moralaj pripensoj. Sufiĉas diri, ke la edzino kaj mi nin konsolis, kaj mi daŭrigis mian laboron laŭ tiom da viveco, kiom mi faris antaŭ ol okazis tiuj du ĉagrenigaj monperdoj, kiuj sekvis unu la alian tiel rapide. La sola afero, kiu min ĝenis, estis, kiel mi povos min teni antaŭ Saadi, kiam li venos por demandi, kian uzon mi faris el liaj ducent orpecoj, kaj kiom mi plibonigis mian vivmanieron per lia malavareco.

Forpasis pli longa tempospaco en tiu okazo ol en la unua, antaŭ ol la du amikoj revenis por informiĝi pri mia situacio, kvankam Saad ofte proponis al Saadi, ke ili faru al mi viziton; sed tiu ĉiam volis ĝin prokrasti. ”Ĉar,” li diris, ”ju pli longe ni prokrastos, des pli riĉa fariĝos Hasan, kaj tiom pli da kontentiĝo mi havos.”

Fine, iun tagon, kiam Saad kaj Saadi kunestis kaj disputis pri tiu temo, Saad diris: ”Ni sufiĉe parolis pri

ĉi tiu afero; mi intencas, ĉi tiun tagon mem, sciigi min pri tio, kio okazis; estas nun la horo por promeni; ni ne prokrastu plu, sed iru tuj vidi, ĉu vi, ĉu mi, estas prava pri la afero.”

Kiam mi vidis ilin de malproksime, mi tiel terure konsterniĝis, ke mi volis tuj lasi mian laboron kaj forkuri por min kaŝi. Tamen mi min detenis kaj, farante mienon kvazaŭ mi fervore laboras, ŝajnis, ke mi ilin ne vidas, kaj mi ne levis la okulojn, ĝis kiam ili estis apude kaj min salutis; tiam mi ne povis ne paroli al ili. Mallevente la kapon, mi rakontis al ili mian lastan malfeliĉon kaj ĉion, kio okazis, kaj konfesis, ke mi estas tiel malriĉa, kiel mi estis ĉe la unua renkonto.

Tiam, turnante min al Saadi, mi diris: ”Plaĉis al Dio, kies metodoj estas sekretaj kaj nepenetreblaj, ke mi ne estu riĉigita per via malavareco; Li volas, ke mi estu malriĉa; tamen, mi ĉiam sentos, ke mia ŝuldo de dankeco al vi estas tute sama, kvazaŭ via malavareco havus la efikon, kiun vi deziris.”

Post tiuj vortoj, mi silentis; kaj Saadi respondis: ”Kvankam, Hasan, mi volus konvinkiĝi, ke ĉio, kion vi diras al ni estas vera, kaj ne okazis pro via diboĉeco kaj malbona mastrumado, mi devas tamen ne esti malŝparema, nek ruinigi min por eksperimento. Mi ne bedaŭras plej malmulte la kvarcent orpecojn, kiujn mi donis al vi por plibonigi vian staton en la mondo. Tion mi faris por la amo al Dio, ne atendente alian rekompencan ol la plezuron fari bonon. Se io povus igi min penti pri tio, kion mi, faris, tio estus, ke mi ne turnis min al iu alia persono, kiu eble farus pli bonan uzon el mia bonfaraĵo.” Tiam,



turniĝinte al sia amiko, li daŭrigis: "Vi vidas el tio, kion mi diris, ke mi ne tute cedas al vi pri la disputata punkto. Vi mem povas nun fari vian propran eksperimenton kaj pruvi al mi, ke doni monon ne estas la sola rimedo por fari malriĉulon riĉa. Prenu Hasanon kiel vian provilon. Kion ajn vi donos al li, mi ne povas kredi, ke li fariĝos pli riĉa, ol li estis per miaj kvarcent orpecoj."

Saad tenis en sia mano pecon de plumbo, kiun li montris al Saadi. "Vi vidis min," li diris, "preni ĉi tiun pecon de plumbo, kiun mi trovis sur la strato; mi ĝin donos al Hasan; kaj vi vidos en kia grado ĝi estos al li valora."

Saadi ridegis je Saad. "Kiom valoras tiu peco de plumbo?" diris li, "unu spesdekon! Kion Hasan povas fari el tio?"

Sed Saad, ignorante lin, ĝin prezentis al mi, kaj diris: "Prenu ĝin, Hasan; ne atentu pri Saadi; lasu lin ridi; iam alian tempon, vi diros al ni kian bonŝancon ĝi al vi alportis."

Mi kredis, ke Saad ŝercas, kaj volas sin amuzi; tamen, mi metis la plumbon en la poŝon, kaj lin dankis. La du amikoj tiam daŭrigis sian promenon, kaj mi reiris al mia laboro.

Tiun nokton, kiam mi demetis miajn vestojn, la peco de plumbo — pri kiu mi ne malŝparis penson, de la tempo, kiam Saad ĝin al mi donis — falis el mia poŝo. Mi levis ĝin, kaj ĝin metis en la unuan oportunan lokon.

La saman nokton okazis, ke fiŝkaptisto, flikante siajn retojn, trovis, ke peco de plumbo mankas al ili. Sciante, ke li ne povos aĉeti plumbon je tiu horo de nokto, pro tio, ke la butikoj estas fermitaj, kaj sciante ankaŭ, ke, se

li ne povos fiŝkapti en tiu nokto, lia familio devos seniĝi je pano la proksiman tagon, la fiŝkaptisto vokis sian edzinon, kaj ordonis, ke ŝi eliru kaj demandu, ĉu iu najbaro povas doni al li pecon. Elirinte, ŝi iris de pordo al pordo sur ambaŭ flankoj de la strato, sed nenian plumbon povis ricevi.

Fine, tamen, ŝi alvenis al mia domo, kaj frapinte laŭte sur la pordon, vekis min el profunda dormo. Mi demandis, kion ŝi bezonas. "Hasan al-Habal," ŝi diris, tiel laŭte, kiel ŝi povis kriegi, "mia edzo bezonas pecon de plumbo por fliki siajn retojn, kaj petegas, ke vi donu al li pecon."

Tiel freŝa en mia memoro estis la peco de plumbo, kiun Saadi donis al mi, kaj kiu, apenaŭ antaŭ unu horo, falis el mia vesto, ke mi ne povis ne rememori ĝin. Mi ĝin donis al la fiŝkaptista edzino, kiu, sub premo de ĝojo, promesis, ke mi havos, pro mia servemo, la unuan fiŝkaptadon de la retoj.

La fiŝkaptisto tiel ĝojis vidi la plumbon, kiun li tiel malmulte atendis, ke li tre multe aprobis la promeson de sia edzino. Li plenumis la retflikadon, kaj iris fiŝkapti, laŭkutime du horojn antaŭ la tagiĝo. Per la unua retĵeto, li kaptis nur unu fiŝon, longan ĉirkaŭ unu metron kaj grandan proporcie; poste, li faris grandan nombron da sukcesplenaj ĵetoj, sed el ĉiuj fiŝoj, kiujn li kaptis, ne unu el ili estis egalmezura je la unua.

Fininte sian enretigadon, la fiŝkaptisto iris hejmen, kaj lia unua penso estis pri mi. Mi treege surpriziĝis, dum mi laboris, vidi lin, kun granda fiŝo en mano, eniri mian laborejon. "Najbaro," li diris, "mia edzino, repage por via

bonvolo, promesis al vi, hieraŭ nokte, ĉiujn fiŝojn, kiujn mi kaptos per mia unua retĵeto en la rivero, kaj mi aprobis ŝian promeson. Plaĉis al Dio sendi al mi nur ĉi tiun por vi, kiun, kia ĝi estas, mi esperas, ke vi akceptos.”

”Najbaro,” mi diris, ”la peceto de plumbo, kiun mi al vi sendis, estis tia bagatelo, ke ĝi ne devus esti tiel alte taksita; la najbaroj devus helpi unu al la alia pri iliaj bezonetoj.”

Tamen mi akceptis la fiŝon, kaj ĝin portis endomen al mia edzino. ”Jen,” mi diris, ”prenu ĉi tiun fiŝon, kiun nia najbaro, la fiŝkaptisto, donacis al mi, page por la peceto de plumbo, kiun mi donis al lia edzino hieraŭ nokte; mi kredas, ke tio estas ĉio, kion ni ricevos el la donaco de Saad, kiu diris, ke ĝi alportos al mi bonŝancon.”

Tiam mi sciigis mian edzinon pri ĉio, kio okazis ĉe la vizito de la du amikoj.

Purigante la fiŝon, mia edzino trovis en ĝia internaĵo grandan diamanton, kiun ŝi prenis por peco de vitro. Ŝi donis ĝin al la malplej aĝa el miaj infanoj por ludilo; kaj liaj gefratoj enmanigis ĝin unu al alia por admiri ĝian brilecon kaj belecon.

En la vespero, kiam la lampo estis bruligita, kaj la infanoj ludis kun la diamanto, ili vidis, ke ĝi elĵetas brilajn lumradiojn kiam ajn mia edzino, kiu pretigis la vespermanĝon, staras inter ili kaj la lampo.

Post la vespermanĝo la infanoj denove kunvenis, kaj komencis fari tiom da bruoj, ke mi alvokis al la plej aĝa por demandi, kial ili faras tian bruon. ”Patro,” diris li, ”estas pri peco de vitro, kiu plej brile lumas, kiam ni turnas la dorsojn kontraŭ la lampo.”

Mi ordonis, ke li ĝin alportu al mi, kaj mi faris mem la eksperimenton. La efiko estis tiel eksterordinara, ke mi demandis al mia edzino, kio la peco estas, kaj ŝi respondis: "Ĝi estas peco de vitro, kiun mi elprenis el la interno de la fiŝo, kiam mi ĝin purigis."

Mi kredis, same kiel ŝi, ke ĝi estas nur peco de vitro; sed mi decidis fari pluan eksperimenton pri ĝi. Mi ordonis, ke mia edzino kaŝu la lampon en la kamentubo, kion ŝi faris, kaj mi ankoraŭ trovis, ke la ŝajna peco de vitro tiel lumis, ke ni povas vidi enlitiĝi sen la lampo; tial mi estingis ĝin kaj metis la vitropecon sur la kamentubon por ke ĝi lumu al ni. "Jen," mi diris, "alia utilo, kiun la Saad'a peco de plumbo havigis al ni; ĝi ŝparos al ni elspezojn por oleo."

La morgaŭan matenon, ne pensante plu pri la vitro, mi iris al mia laboro kiel kutime. Tio ne ŝajnos stranga pri homo kiel mi, kiu neniam vidis diamantojn, aŭ, se mi eble jam ilin vidis, ĉiukaze ne sciis iom pri ilia valoro.

Sed antaŭ ol daŭrigi mian rakonton, mi devas diri, ke staris tre maldika apartiga muro inter mia domo kaj tiu de mia proksima najbaro, kiu estis tre riĉa hebreo, juvelisto laŭ metio; kaj la ĉambro, kiun okupis li kaj lia edzino, estis apuda al la mia. Ili ambaŭ kuŝis en lito, kiam la bruo, kiun faris miaj infanoj, vekis ilin.

La morgaŭan tagon, la edzino de la juvelisto venis al mia domo por plendi, ke ili estis vekitaj el sia unua dormo. "Bona najbarino, Rahelo," (kiel estis nomata la juvelista edzino), diris mia edzino, "mi tre bedaŭras tion, kio okazis, kaj esperas, ke vi senkulpigos nin. Vi scias, kiaj estas la infanoj, kaj kiel ili ridas kaj ploras pro



bagatelo. Eniru, kaj mi montros al vi tion, kio kaŭzis la tutan bruon.”

La hebreino do eniris, kaj mia edzino — depreninte la diamanton (ĉar tia ĝi vere estis, kaj de neordinara kvalito) de la kamenbreto — donis ĝin en ŝiajn manojn. ”Jen,” diris ŝi, ”estas ĉi tiu peco de vitro, kiu kaŭzis la tutan bruon.”

Dum la hebreino, kiu estis virtuoŝino pri ĉiuj specoj de multekostaj ŝtonoj, esploris admire la diamanton, mia edzino rakontis, kiel ŝi ĝin trovis en la ventro de la fiŝo, kaj ĉion, kio okazis.

”Nu, Ajŝaĉ,” (la nomo de mia edzino), diris la juvelista edzino, redonante la juvelon, ”mi kredas, same kiel vi, ke ĝi estas peco de vitro; sed, ĉar ĝi estas pli bela ol ordinara vitro, kaj, ĉar mi havas hejme ĝuste tian alian pecon, mi ĝin aĉetos, se vi ĝin vendos.” La infanoj — aŭdante ilin parolantajn pri la vendado de ilia ludilo — tuj interrompis la interparoladon, plorante kaj petante, ke ilia patrino ne fordonu ĝin; kaj ŝi, por trankviligi ilin, promesis, ke ŝi ĝin ne vendos.

La hebreino, maltrafigite de la infanoj pri sia projektita marĉando, eliris, sed antaŭe subparolis al mia edzino ĉe la pordo, ke ŝi ne montru al iu la diamanton, ne antaŭsciigante ŝin.

La hebreo eliris frumatene al sia butiko en tiu parto de la urbo, kie la juvelistoj kutimis negoci. Tien poste iris lia edzino, kaj sciigis lin pri la eltrovaĵo, kiun ŝi faris. Ŝi rakontis pri la grandeco kaj pezo de la juvelo, laŭ sia konjekto, kaj parolis pri ĝia beleco, klareco kaj brileco, kaj precipe pri la lumo, kiun ĝi elĵetis en la nokto laŭ la

rakonto de mia edzino, kio estis des pli kredinda, ĉar mia edzino ŝajnis tute naiva kaj malklera virino.

La hebreo tuj resendis sian edzinon al mia, kaj ordonis, ke ŝi marĉandu pri la diamanto, laŭ sia eblo. Li konsilis, ke ŝi unue proponu malgrandan sumon, kiu estos, ŝia opinie sufiĉa, kaj poste plialtigu la prezon, se necese; sed, ĉiuokaze, ŝi devas aĉeti ĝin, je kia ajn kosto.

Sekve, la hebreino venis denove al mia edzino private, kaj, ne atendente sciigî, ĉu mia edzino volas vendi la diamanton, demandis, ĉu ŝi akceptos dudek orpecojn por tiu vitropeco. Mia edzino opiniis, ke tio estas granda sumo por peco de vitro, kiel ŝi ĝin opiniis, sed ŝi ne volis fari ian interkonsenton, dirante, ke ŝi ne povas fordoni ĝin sen mia konsento.

Dume mi revenis de mia laboro por la tagmanĝo. Ili parolis apud la pordo, kiam mi alvenis, kaj mia edzino haltigis min kaj demandis, ĉu mi vendos la pecon de vitro, kiun ŝi trovis en la fiŝa ventro, por dudek orpecoj, kiujn nia najbarino por ĝi proponis. Mi ne faris respondon, sed tuj pripensis pri tio, kio diris al mi Saad, kiam li donis al mi la pecon de plumbo, nome, ke ĝi alportos al mi bonŝancon.

La hebreino — imagante, ke mi silentas pro tio, ke la prezo, kiun ŝi proponis, estas tro malalta — diris: "Mi donos al vi kvindek pecojn, se tio sufiĉas."

Tuj kiam mi trovis, ke per unu salto ŝi plioferas de dudek ĝis kvindek, mi diris al ŝi, ke mi multe pli multe postulas.

"Nu, najbaro," diris ŝi, "mi donos al vi cent; kaj tio estas

tia granda sumo, ke mi ne estas certa, ĉu mia edzo ĝin aprobos.”

Ĉe tiu nova pliofero, mi diris al ŝi, ke mi devas ricevi por ĝi centmil orpecojn; ke mi scias, ke la diamanto multe pli multe valoras, sed — por fari komplezon al ŝi kaj ŝia edzo, kiuj estas najbaroj — ke mi ne postulos pli ol tiun prezon, kiun mi nepre intencas ricevi; kaj ke, se ili rifuzos doni tiun sumon, mi min turnos al aliaj juvelistoj, kiuj multe pli multe donos.

La hebreino mem jam min firmigis pri tiu decido, per ŝia evidenta avideco fini la interkonsenton, kaj per sia altigo de la prezo en kelkaj plidonoj ĝis kvindek mil pecoj, kiujn mi rifuzis.

”Mi ne povas proponi al vi pli multe,” ŝi diris, ”sen la konsento de mia edzo. Li estos hejme hodiaŭ vespere; kaj vi faros al mi favoron, se vi atentos ĝis kiam li vidos la objekton.” Tion mi promesis.

En la vespero, kiam la hebreo revenis hejmen, lia edzino diris al li, kion ŝi faris; ke ŝi ne povis interkonsenti kun mia edzino, nek kun mi; ke ŝi proponis, kaj mi rifuzis, kvindek mil orpecojn; kaj ke mi promesis atendi, laŭ ŝia peto, ĝis la vespero, kiam ŝia edzo revenos hejmen.

La hebreo atendis ĝis la horo, kiam mi ĉesis labori, kaj tiam venis al mi. ”Najbaro Hasan,” li diris, ”ĉu vi bonvolos montri al mi la diamanton, kiun via edzino montris al mia?”

Mi lin kondukis en la domon, kaj ĝin montris al li. Ĉar estis tre mallume, kaj mia lampo ne estis bruligita, li tuj sciis — per la lumo, kiun faris la diamanto, kaj per

la brilo, kiun ĝi ĵetis sur mian manon — ke ĉio, kion lia edzino jam rakontis pri ĝi, estas vera. Longatempe li ĝin rigardis kaj admiris.

”Nu, najbaro,” diris li, ”mia edzino sciigis min, ke ŝi al vi proponis kvindek mil orpecojn; mi donos al vi dudek mil plie.”

”Najbaro,” mi respondis, ”via edzino povas vin sciigi, ke mi taksas mian diamanton je centmil pecoj, kaj mi certigas vin, ke mi ne intencas akcepti malpli ol tiun sumon.”

Longatempe li marĉandis kun mi, esperante, ke mi malplialtigos mian postulon; sed — fine trovinte, ke mi nepre ne cedos, kaj, timante, ke mi ĝin montros al aliaj juvelistoj, kion mi certe jam decidis fari, se li rifuzos mian postulon — li ne lasis min ĝis kiam la marĉando estis farita laŭ miaj propraj kondiĉoj.

Li diris al mi, ke li ne havas tiom da mono en sia domo, sed ke li pagos al mi la tutan sumon je la sama horo morgaŭ; kaj, reirinte al sia domo, li revenis, alportante du sakojn, enhavantajn en ĉiu po mil pecoj, kiujn li donis al mi partopage. La morgaŭan tagon, je la difinita horo, li alportis al mi la restaĵon de la interkonsentita sumo, kaj mi transdonis al li la diamanton,

Tiel vendinte mian diamanton, kaj riĉiĝinte, senlime ekster miaj plej fantaziaj revoj, mi dankis Dion pro lia bonfareco kaj donacemo; kaj mi volus iri kaj ĵeti min antaŭ la piedojn de Saad, por esprimi mian dankemon, se mi konus la domon, kie li loĝas; kiel ankaŭ antaŭ Saadin, kiu estis mia unua bonfaranto, kvankam lia bona intenco ne havis la saman sukceson. Poste mi pripensis,

kiamaniere mi povos plej bone fari uzon el tia granda monsumo.

Mi pasigis tiun tutan tagon kaj la sekvantan rondirante al homoj de mia propra metio, kiuj, sammaniere kiel mi mem, forte laboris por sia ĉiutaga pano; kaj donante al ili monon kiel antaŭpagon, mi ilin dungis labori por mi pri diversaj specoj de ŝnurfabrikado, laŭ sia lerteco kaj kapableco, promesante, ke mi ilin ne atendigos por ilia mono, sed ke mi pagos al ili tuj kiam ilia laboraĵo estos farita.

Per tiaj rimedoj mi monopolis la tutan ŝnurindustrion de Bagdado, kaj ĉiuj kontentiĝis pro mia ĝusta kaj akurata pagado.

Ĉar tia granda nombro da laboristoj devas produkti multe da komercaĵoj, mi luis tenejojn en diversaj partoj de la urbo por enteni miajn vendotaĵojn, kaj super ĉiu tenejo mi difinis komizon por vendi pogrande kaj podetale; kaj per tiu aranĝo mi ricevis sufiĉe grandan profiton, kaj amasigis multe da enspezoj. Poste, por kunigi en unu lokon miajn tenejojn, kiuj estis tre disigitaj, mi aĉetis grandan domon, kiu staris sur vasta terpeco; sed ĉar ĝi estis en stato ruina, mi ĝin malkonstruis, kaj konstruis tiun, kiun Via Reĝa Moŝto vidis hieraŭ, kaj kiu, kvankam ĝi montras belan aspekton, konsistas plejparte el tenejoj por mia negociaĵoj, kune kun apartamentoj ĝuste sufiĉaj por mi kaj mia familio.

Iom da tempo post kiam mi forlasis mian malnovan domaĉon, kaj translokiĝis en ĉi tiun novan, Saad kaj Saadi — kiuj apenaŭ pensis pri mi de sia lasta vizito ĝis tiu tempo — promenis, iun tagon, kune, kaj trapasante

mian straton, decidis viziti min; sed granda estis ilia surprizo, kiam ili ne trovis min laborantantie kiel kutime. Sed ilia surprizo estis duobligita, kiam oni diris al ili, ke mi fariĝis riĉa komercisto, kaj ne estas plu nomata simple Hasan, sed Kogja Hasan al-Habal, kiu estas, tiel diri, Komercisto Hasan Ŝnurfaristo, kaj ke mi jam konstruis, sur strato nomata, domon similan al palaco.

La du amikoj iris rekte al tiu strato; kaj, sur la vojo, Saadi — kiu ne povis imagi, ke la peco de plumbo, kiun Saad donis al mi, iel povus fari min riĉulo — diris al Saad: ”Mi supermezure ĝojas, ke mi faris Hasan al-Habalon riĉulo; sed mi ne povas pardoni al li la du mensogojn, kiujn li diris al mi, por akiri kvarcent pecojn anstataŭ ducent; ĉar nek mi nek iu alia povas rilatigi lian bonŝancon al la peco de plumbo, kiun vi al li donis.”

”Tio estas via opinio,” respondis Saad, ”sed ĝi ne estas mia. Mi ne scias, kial vi devas fari al Kogja Hasan la maljustaĵon kredi, ke li estas mensogulo. Vi devas permesi al mi kredi, ke li diris la veron kaj kaŝis de ni nenion, kaj ke la peco de plumbo, kiun mi al li donis, estas la vera kaŭzo de lia prospereco, kion, vi trovos, li baldaŭ al ni rakontos.”

Tiel diskutante la aferon, la du amikoj eniris la straton, kie mi loĝis, kaj demandis, kiu estas mia domo. Post kiam ĝi estis montrita, kaj ili rigardis ĝian fasadon, ili apenaŭ povis kredi, ke ĝi al mi apartenas.

Tuj kiam mia servisto ilin enkondukis en mian ĉambron, mi rekonis la du amikojn ĉe la unua rigardo. Mi leviĝis el mia sidejo kaj kuris al ili renkonte, kaj volis kisi la borderon de iliaj vestoj, sed tion ili ne permesis,



sed ĉirkaŭprenis min. Mi invitis ilin sidiĝi sur kanapo aranĝita por kvar personoj, kiu staris plenvide de mia ĝardeno, kaj petis, ke ili okupu la lokon de honoro, sed ili deziris, ke mi prenu tiun lokon. Mi certigis ilin, ke mi ne forgesis, ke mi estis la malriĉa Hasan al-Habal, nek la favorojn, kiujn mi al ili ŝuldis; sed, se eĉ tio ne estus la fakto, mi bone sciis la respekton ŝuldatan al ili, kaj petis, ke ili ne ĝenu min, rifuzante okupi la pli altrangajn sidejojn. Sekve, ili konformiĝis al mia peto, kaj sidiĝis sur la deca loko, kaj kontraŭ ili mi sidiĝis.

Mi rakontis al ili ĉion, kio okazis; sed Saadi persisteme rifuzis kredi mian rakonton, kaj ĉiuj miaj protestaĵoj ne povis ŝanceli lian malkredon. "Kogja Hasan," li diris, "la aventuro de la fiŝo kaj de la diamanto trovita en ĝia ventro ŝajnas al mi same nekredebla kiel viaj fabeloj, ke la milvo forflugis kun via turbano kaj, ke via edzino interŝanĝis la vazon da brano por la puriga sablo. Sed, kio ajn okazis, mi estas egale konvinkita, ke vi ne estas plu malriĉa, sed riĉa; kaj, ĉar mia intenco estis, ke vi riĉiĝos per mia helpo, mi sekve pro tio plej sincere ĝojas."

Ĉar nun malfruiĝis, ili leviĝis por diri adiaŭ; sed mi ilin haltigis, dirante: "Sinjoroj, unu favoron plie; mi petas, ke vi ne rifuzu al mi la honoron vespermanĝi ĉe mi, kaj resti la nokton en mia domo; kaj morgaŭ mi vin akvoveturigos al malgranda kampodomo, kiun mi aĉetis por ĝui la freŝan kamparan aeron; de kie ni povos reveni la saman tagon rajde sur miaj ĉevaloj."

Ili volonte akceptis mian inviton; kaj kiam la servistoj anoncis, ke la vespermanĝo estas metita sur la tablon, mi ilin kondukis en alian ĉambron. Ili tre admiris la

lumigon, la telermeblon kaj la ornamon de la ĉambro, sed precipe ili ĝuis la manĝaĵojn, per kiuj mi ilin regalas. Dum la festeno, mi ilin amuzis per koncerto de voĉa kaj instrumenta muziko, kaj poste per aro da dancistinoj kaj aliaj amuzaĵoj, klopodante kiel eble plej multe montri al ili mian dankemon.

La morgaŭan tagon — ĉar ni jam interkonsentiĝis ekiri frue por ĝui la freŝan aeron — ni iris al la riverbordo je la sunleviĝa horo kaj enŝipiĝis en promenboaton, bone tapiŝitan, kiu nin atendis. Post ne plena horo kaj duono, per la helpo de ses lertaj remistoj kaj de la tajdo, ni venis al mia kampodomo.

Post kiam ni elŝipiĝis, la du amikoj haltis por rigardi la belecon de la eksteraĵo de mia domo kaj por admiri la oportunan situacion, kiu donis belajn vidaĵojn, nek tro limigitajn, nek tro vastajn, sed ĉarman panoramon ĉe ĉiuj flankoj.

Poste ni promenis en la ĝardeno, kie plej multe plaĉis al ili bosko da oranĝaj kaj citronaj arboj, plantitaj laŭ egalaj interspacoj, kaj ŝarĝitaj de fruktoj kaj floroj; freŝakva rivereto, elfluanta el beleta rivero apude, akvumis la arbojn. Mi ilin kondukis ĝis la fino de la bosko, kiu estis tre longa kaj larĝa; tie mi montris al ili arbaron da grandaj arboj, kie finiĝis mia ĝardeno. Tiam mi ilin kondukis al laŭbo, malfermita ĉe ĉiuj flankoj, sed ombrita al la sunradioj per grupoj da palmoj, kiuj estis tiel lokitaj, ke ili ne baras la vidaĵon. Mi invitis ilin eniri kaj ripozi sur kanapo kovrita de molaj kaj luksegaj kusenoj.

En la laŭbo troviĝis du el miaj knaboj, kiujn mi jam sendis tien antaŭ kelke da tempo, kune kun ilia guvern-



isto por profiti per la aero. Je nia alveno, ili nin lasis, kaj eniris la arbaron por serĉi birdnestojn.

Baldaŭ poste ili revenis plenplenaj de ĝojo. ”Jen, patro,” diris la plej aĝa, ”ni trovis ĉi tiun neston inter la branĉoj de arbo, kiun mi surgrimpis. Vidu! ĝi estas konstruita en turbano!”

La du amikoj ne estis pli mirigitaj ol estis mi, pri ĉi tiu strangaĵo; sed mi multe pli miregis, tuj kiam mi rekonis la turbanon kiel tiun saman, kiun la milvo forportis de mi.

Ĉirkaŭturninte ĝin, kaj esplorinte ĝin zorge, mi diris al miaj gastoj: ”Sinjoroj, eble vi rememoros la turbanon, kiun mi portis en la tago, kiam vi unuafoje faris al mi la honoron viziti mian ŝnurejon?”

”Mi opinias,” diris Saad, ”ke nek mia amiko, nek mi multe atentis ĝin; sed, se ĝi enhavus la cent naŭdek orpecojn, mi ne povus dubi la fakton.”

”Sinjoro,” mi respondis, ”ne estas dubo, ke ĝi estas la sama turbano; ĉar, ekster la fakto, ke mi ĝin tre bone konas, mi sentas per la pezo, ke ĝi tro pezas por esti iu alia; kaj vi ankaŭ tion sentos, se vi bonvolos ĝin teni en via mano.”

Poste, elpreninte la birdojn, kaj doninte ilin al la infanoj, mi ĝin metis en liajn manojn, kaj li ĝin donis al Saadi.

”Efektive,” diris Saadi, ”mi kredas, ke ĝi estas via turbano, sed mi estos pli bone konvinkita, kiam mi vidos la cent naŭdek orpecojn.”

”Nu, sinjoro,” mi aldiris, reprenante la turbanon, ”rigardu atente, antaŭ ol mi ĝin disvolvos, ke ĝi sidis tre

longe sur la arbo; observu ankaŭ ĝian eksteraĵon kaj staton, kaj kiel lerte la nesto estas en ĝi konstruita, ne tuŝita de la homa mano; ĉio tio sufiĉe pruvas, ke la turbano restis tie, de tiu tago mem, kiam la milvo ĝin forprenis de mi, kaj ke la birdo aŭ faligis aŭ kuŝigis ĝin sur la arbon, kies branĉoj malhelpis, ke ĝi falis teren.”

Tiam mi detiris la tolan tukon, kiu envolvis la ĉapeton de la turbano, kaj elprenis la monujon, kiun Saadi rekonis kiel tiun, kiun li al mi donis. Mi malplenigis ĝin antaŭ ili sur la tablo, kaj diris: ”Jen, sinjoroj, la mono; kalkulu ĝin kaj vidu, ĉu ĝi estas ĝusta.”

Saadi kalkulis la sumon kaj trovis, ke ĝi estas cent naŭdek orpecoj; kaj tiam Saadi, kiu ne povis nei tian evidentan pruvon, alparolante min, diris: ”Mi konsentas, Kogja Hasan, ke ĉi tiu mono ne povis helpi riĉigi vin; sed la alia sumo de cent naŭdek pecoj — kiun vi volus kredigi al mi, ke vi kaŝis en pota da brano — povis ja tion efektiviĝi.”

”Sinjoro,” mi respondis, dolorigita pro lia nekredemo, ”certe vi ne volus, mi esperas, ke mi retiriĝu, kaj per malvera konfeso faru min mensogulo?”

En la vespero, ni surĉevaliĝis kaj, deĵorite de unu el miaj sklavoj, revenis al Bagdado.

Okazis — mi ne sciis per kia senzorgo de la flanko de miaj servistoj — ke mankis al ni aveno por la ĉevaloj; kaj — ĉar malfruis, kaj la grenenejoj estis ĉiuj fermitaj — unu el miaj sklavoj eliris por serĉi iom en la najbaraĵo.

Li trovis en butikoj terpoton da brano, kiun li aĉetis kaj alportis al la ĉevalejo, promesante, ke li redonos la poton en la sekvonta tago. La sklavo malplenigis la branon en

la stalmanĝejon, sed, disdonante ĝin per la manoj inter la ĉevaloj, li palpis tolan tukon, nodligitan kaj tre pezan. Li alportis al mi la tukon ĝuste en sama stato, kiel li ĝin trovis, kaj ĝin donis al mi, dirante, ke eble ĝi estas tiu sama tuko, pri kiu li ofte aŭdis min paroli inter miaj amikoj.

Ĝojgite supermezure, mi diris al miaj du bonfarintoj: "Sinjoroj, plaĉis al Dio, ke antaŭ nia disiĝo vi estu plene konvinkitaj, ke mi diris al vi la veron, pri kiu mi neniam ĉesis vin certigi." Tiam turninte min al Saadi, mi daŭrigis: "Jen estas la aliaj cent naŭdek orpecoj, kiujn vi donis al mi; tion mi bone scias per la tuko, kiun mi kunligis per miaj propraj manoj."

Tiam mi kalkulis la monon antaŭ ili, kaj ordonis, ke oni alportu al mi la poton, kiun mi tuj rekonis. Poste mi ordonis, ke unu el miaj sklavoj alportu la poton al mia edzino, kaj demandu, ĉu ŝi ĝin rekonas, sed ne dirante al ŝi ion pri tio, kio okazis. Tuj kiam ŝi vidis la poton, ŝi ĝin rekonis, kaj resendis la sklavon por sciigi min, ke ĝi estas la sama vazo, kiun, plenan de brano, ŝi interŝanĝis por la puriga sablo.

Saadi volonte submetiĝis, kaj forlasis sian nekredemon; poste, turninte sin al Saad, li diris: "Mi cedas al vi, kaj konfesas, ke la mono ne estas ĉiam la rimedo per kiu oni riĉiĝas."

Kiam Saadi finis paroli, mi diris al li: "Mi ne kuraĝas proponi redoni al vi la tricent okdek orpecojn, kiujn plaĉis al Dio malkaŝi por seniluziigi vin pri mia honesteco. Mi konvinkiĝis, ke vi ilin ne donacis al mi en la celo, ke mi ilin al vi redonu. Miaflanke, mi estas tre kontenta

je tio, kion la Diantaŭzorgo jam sendis al mi per aliaj rimedoj, kaj mi neniel intencas fari uzon el la mono por mia propra profito; sed, se vi aprobos, morgaŭ mi ĝin disdonos inter la malriĉularo, por ke Dio nin ambaŭ benu.”



Fabelo el la kolekto "1001  
noktoj". Tradukis George Cox.

